Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

http://www.educar.org/Revistas/Esperanto/k46.htm

http://www.dragonfire.net/~Esperanto/k46.htm

Venu al Moskvo

SAT-kongreso 73-a

Nº 46 **Julio/Septembro 2000**

Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
c/ Jabonerías, 6-3ºD,
ES30 001 Murcia (Hispanio)

Vicprezidanto: ankoraŭ neniu oficas

Kasisto: ***José María Bernabéu Franco***
Gral. Primo de Rivera, 8
E-03360 Callosa de Segura,
ALICANTE (Hispanio).

Sekretario: ***José Pina Tuells,***
c/ Stª Teresa, 22-2º CD,
ES30005 MURCIA

Libroservo: ***María del Mar Guirao,***
Avdª Juan Carlos I, 22-8H
ES30800 Lorca
Murcia (Hispanio)

Redaktoro: ***Jesuo de las Heras,***
Apartado 4461
ES30080 MURCIA

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la ***nova konto*** *nº* ***1302 0412 86 0022655110*** *en libreta de Caja Postal. Sen aldona kosto.*La abono kostas 1000 pesetojn aŭ 6 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

Pretigas la Kajeron:
Provkorekto: **José Pina Tuells,**
Redakto: **Jesús de las Heras Jiménez.**

Kovrilo: Ĉu ni renkontos en Moskvo?
Unuatoje SAT povas kongresumi en la ĉefurbo de eksa 1984

Enhavo

Redaktore 3
Informoj de la Prezidanto 4
La kokidoj kaj la geografio 4
Adiaŭ, Stanjo 5
Ve al VEF 6
Ĉu esperanta retaĵo inter indiĝenaj popoloj? 7
La prezidanto de la Germana Esperanto Asocio 9
Interredaktore 10
Pri prezidanto de VEF 11
Ĉu ignoro, pedanteco aŭ insulto? 11
Intervjo al prezidanto de SAT 12
La provizordungaj entreprenoj 15
La nova edukado ne funkcias 17
Esperantisto de la jaro 19
Triangulujo 21
Enkonduko en muzikon 23

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.

Redaktore:

Klarigo dua.

Antaŭ du jaroj mi deziris al vi ĉiuj, ke prokrastro ne plu atingos nin. Tiam, marto de 1998, malsano kaj komputila malbonŝanco kaj neespertemo kulpis. Nun la prokrasto ŝuldas sian ekziston al komputila atenco de *haker* kaj malbonvolo de esperantista retano.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi ricevis viziton en mia komputilo de *hakero* dum mi navigis tra Interreto. Li malkaŝe lasis mesaĝon dirante, ke li estis ĉi tie, kaj avertis, ke li revenos. Mi ne sciis, ĉu li lasis *trojanon* (tio estas, programo kaŝita, kiu avertas lin, ke mi enretiĝas), do mi devis *formatei* la tutan diskon malmolan por efektive purigi mian sistemon el tiu *viruso.* La procezo estis longa kaj teda, kaj mi ne certas, ĉu mi ankoraŭ havas ĉiun informon necesan ĉe mia komputilo. Sed la malplej bona sekvo al tiu afero estas, ke **Kajeroj el la Sudo** prokrastis sian aperon ĝis nun. Mi honeste devas aldoni, ke mi ankaŭ devis atendi kelkajn personajn aferojn, kaj mi ne povis atenti pri la eldono de nia revuo tiel intense kiel kutime. Mankis artikolantoj, kiel kutime, kaj sekve mi devis verki kelkajn mi mem. Pro tiuj kialoj, mi decidis, ke ĉar ni atingis junion, estas plej konvene tute ne eldoni la numeron de aprilo, sed *frue* pretigi tiun de julio.

Eble estos speciala numero pri la venontaj kongresoj. Ĉi somere mi esperas viziti la kongresojn de SAT kaj tiu de UEA. La unua estos en Moskvo, kaj la dua en Tel-Avivo. Esperanto estas sufiĉe malforta floro en ĉiutaga vivo sovaĝa kaj maletika, kaj ni esperantistoj devus akvumi ĝin per nia partopreno en esperantaj kunvenoj. Ni haleanoj devus partopreni plej ofte kiel eble, la kongreson de SAT. Antaŭ kelkaj tagoj mi legis ie, ke SAT alfrontos malaperon, se oni ne ĉeestas kongresojn. Estas bedaŭrinde, ke tiom da ni ne havas la monan rimedon por ĉeesti la kongresojn, sed almenaŭ ni povas apogi kaj aliĝi, eĉ se ni ne iras.

Se mi ne estus irinta al la Kongreso de SAT la lastan jaron, mi ne estus koninta altkvalitan personon, Stanjo Chrdlová, kiu bedaŭrinde forpasis antaŭ kelkaj monatoj. Ni omaĝas ŝin je paĝo 5-a. Alia eksterordinara virino, Katalin Smideliusz, prezentas sian projekton pri indiĝenaj popoloj per Esperanto, en paĝo 7-a.

Ĉe paĝoj 6-a kaj 11-a ni klarigas pri malpli ĝentila afero, tio, kio okazis en VEF la lastan jaron. Mi esperas, ke ekde nun ne estu misinformo pri la afero. Aliflanke, estas tri intervjuoj en niaj paĝoj: tiu, kiun la Prezidanto de SAT ofertis al ni en Karlovy Vary (Ĉeĥio) dum la kongreso de SAT, tiu de la Prezidanto de la Germana Esperanto Asocio, kiu vizitis nin, kaj tiu, kiu **La Ondo de Esperanto** faris al Kep Enderby, prezidanto de UEA kaj ano de SAT, okaze de lia nomiĝo kiel *Esperantisto de la Jaro.*

Falangisto Fernando Letamendía klarigas sian vidpunkton per sia artikolo *La provizordungaj entreprenoj*, kaj instruisto Johano Antono Kabezos tiun sian pri la edukado en nia lando.

Kiel kutime, nia *Kajero* finas per la seria *Enkonduko en Muzikon*, kiun mi esperas, ke vi trovos interesa kaj lerniga.

Ĝis -espereble- baldaŭ, mi kore salutas vin ĉiujn, kamaradojn.

Informoj de la prezidanto

Estimataj samideanoj:

La esperantistaro renkontiĝos en Moskvo, kaj ankaŭ en Tel-Avivo baldaŭ. Esperantujo estos tie, kie troviĝas esperantistoj.

HALE renoviĝas per projektoj venontaj. Ekzemple, mi parolis kun Ĝenerala Direktoro kaj li promesis al mi, ke li subvencios al HALE. Per tiu subvencio mi povos pagi la eldonon de nia revuo kaj ankaŭ pagi la paĝon en Interreto, kiu estas unika paĝo en la esperantista mondo. Kial? La respondo estas facila: ĝi estas la unika paĝo, kie la samajn artikolojn oni prezentas en tri lingvoj kaj, senpage, vi povas legi , aŭskulti, ĝui, prisonĝi, kaj okaze de ĝi vi povas havi momenton da feliĉo: poste de via laborado aŭ diskutado kun neesperantistoj, vi povas sidi en via seĝo kaj enŝalti la komputilon kaj eniri en nian paĝon.

Hale volas organizi Kongreson de SAT en Alikanto. En Hispanio antaŭ dek tri jaroj estis kongreso de SAT, en la urbo San Kugat del Vaĝes' (Sant Cugat del Vallés).

Kiam promenas kune la koro kaj la mensracio, sukceso estas nia. Hale havas koron kaj mensracion por tio, ke ni kongresumos en Alikanto la venontan jaron 2002-an. Estu feliĉaj en Esperantujo!

La kokidoj kaj la geografio.

La kokidoj ĉe elementa lernejo havis egajn malhelpojn por ellabori trafajn konceptojn pri la universala geografio, ĉar, por komenci, ekzistis la tiel nomata 1-a mondo, kaj la 2-a mondo apude; poste, aperis la 3-a mondo, kiu troviĝas pli malproksime, kaj fine, ekzistis gentoj de la 1-a mondo, kiuj loĝas kvazaŭ triamondanoj kaj ili konsistigis la 4-an mondon; krome, okazis ke la 2-a mondo ekdisfaladis kaj, kvankam siaj gentoj deziris formi parton de la 1-a mondo, ili, spite al ĝi glitadis al la 3-a, sed neniu povis forgesi ke ili estis konsistigantaj la 2-an. Pro ĉio tio, la kokidoj ĉiuj fariĝis revoluciuloj internaciistaj, ne nur cele al ke ĉiuj homoj estu egale feliĉaj, sed antaŭ ĉio, por simpligi la studon de la geografio.

Mariano González Mangada



Adiaŭ, Stanjo, adiaŭ!

Stanislava Chrdlova, en Esperantujo konata kiel **Stanjo**, *naskiĝis la unuan de oktobro de 1954 kaj esperantiĝis en 1969. Ŝi sukcesis pri la ekzameno de la Ĉeĥa Esperanto Asocio pri kapablo instrui en 1972. Finstudinto de la universitato en Olomouc, fako pedagogio. Ŝi instruis Esperanton precipe en la formo de mallongaj intensivaj kursoj ne nur en Ĉeĥio, sed per Ĉe-metodo ankaŭ eksterlande, interalie en San Marino kaj ankaŭ inter alie en Koreio (post sia tuttaga instruado de la ĉeĥa lingvo al universitataj studentoj).*

Kunverkinto de la Baza ĉeĥa konversacio (konversacia parto, dum M. Malovec verkis gramatikaĵojn kaj ĉapitron pri la prononco) kaj de lernolibro de Esperanto por Ĉeĥoj ***Esperantem za tri mesice*** *(ankaŭ en ĝi ŝi verkis la konversaciajn partojn).*

El la E-agado de Stanjo ni menciu almenaŭ: prelegojn en Esperanto ĉe AIS (en San Marino) pri sia fako pedagogio, dum UK en Prago ŝi gvidis la kurson de la Ĉeĥa Eksprese, prelegis pri Prago kaj memstare preparis la nacian folkloran vesperon. En 1999, jam sciante pri sia sorto kaj malesperiga prognozo ŝi prelegis pri Historio de kuracado en okcidentbohemiaj banlokoj dum la SAT-kongreso en Karlovy Vary kaj vigle partoprenis la organizajn laborojn de SAT-kongreso kaj ILEI-konferenco.

Sendube tiuj, kiuj aŭdis ŝiajn prezentaĵojn de ĉeĥa kaj morava naciaj folkloroj (kantojn kaj dancojn) kaj admiris ŝin en Moravia nacia kostumo, apenaŭ forgesos tiun travivaĵon. Entuziasme ŝi ĉiĉeronis tra Prago kaj la tuta Ĉeĥio.

Ŝi apartenis al viglaj aktivuloj de Ĉeĥa Esperanto-movado kaj ekde la jaro 1995 ŝi plenumis taskon de ĉefdelegito de UEA kaj UK-peranto por Ĉeĥio.

Sian heroan sed vanan batalon kontraŭ kruela malsano Stanjo malvenkis la 28-an de januaro 2000.

La lasta adiaŭiĝo kun Stanjo okazis en la preĝejo de Sankta Nikolao sur la angulo de Malnovurba placo (Staromestske namesti) kaj Pariza strato (Parizska) en Prago la 11-an de februaro 2000 je 11-a horo.

Ŝi senteble mankos ne nur al la familio, sed ankaŭ en Esperantujo. Ni petas ĉiujn, kiuj konis ŝin, ke ili dediĉu al memoro de Stanjo momenton da trankvilaj rememoroj.

Ve al VEF!

Mi ĵus ricevis leteron de samideano, kiu kongresumis en Requena (rekena) okaze de la Kongreso de la Valencia Federacio kaj Mursjo. Li diris, ke tie *estis proponata, ke denove estu ŝanĝata la nomo de VEF kaj Murcio al VEF, ĉar laŭ klarigoj estas problemoj kiam oni devas postuli subvenciojn aŭ helpon por VEF, ĉar la aldono de Mursjo iel ŝanĝas la koncepton de Valencia regiono. Estis decidate, ke la VEF estraro konsultos vin* [tio estas, K-don Cabezos] *kaj faros laŭ via decido.*

La sendanto de tiu mesaĝo ne estis en la antaŭa kongreso de VEF en Lorko (Mursjo) pasintjare, kompreneble. Tie kamarado Cabezos demisiis, kiel laŭstatute li devis fari ĉar la oficperiodo elĉerpiĝis. Samideano de Valensjo diris, ke komisiis lin kelkaj grupoj de Valensjo por esprimi la opinion, ke laŭstatute la prezidanto de VEF devas loĝi en la Valensja Komunumo, kaj ankaŭ, ke la agado de la federacio VEF devas okazi en la komunumo de Valensjo. Havi la vortojn *kaj Mursjo* en la nomo povas kaŭzi problemojn pri subvencioj kaj leĝaj aferoj, ĉar tio kontraŭas la statuton de VEF. Mi diris, ke la propono, eĉ se leĝa, estas kontraŭesperantisma, ĉar la spirito de Esperanto estas integriga, ne diskriminacia, kaj sekve samideanoj de ĉi tiu parto de Hispanio devas labori kune, kaj se ekstervalensjano ne povas prezidantiĝi, li ankaŭ ne rajtis esti farinta tion antaŭe, laŭ la statuto, kaj tial tiu Kongreso de Lorko estis kontraŭleĝa, kaj sekve iu ajn decido tiea estas nula. Mi sugestis, ke tiel oni devos alvoki novan kongreson -ne *prezidanto* eksterva-lensja, sed kio restas de la antaŭa valensja estraro. La problemo estas, ke ili ĉiuj demisiis en la Kongreso de Benidormo, kvar jarojn antaŭe, kaj la ĉeestantaro benidorma akceptis la novan prezidanton, Juan Antonio Cabezos, la novan sekretarion, José Pina Tuells, kaj la novan kasistinon, María del Mar Guirao Gallego, kiuj ekstervalensjanas. Tio estis, verŝajne, kontraŭstatuta, sed laŭ tiu sama statuto tute norma, ĉar la balotado estis leĝa kaj, ankaŭ, mankis aliu ajn kandidato.

Sed estu kio estu, ni ekstervalensjanoj, kiuj partoprenis la kongreson de Lorko en 1999, kaptis la mesaĝon, kaj senvorte interkonsentis ne plu iri al kongresoj de VEF, pro tio, ke oni ne volas nian ekstervalensjanan agadon. Ankaŭ, post la asembleo, valensja partoprenanto minacis bati min, pro tio, ke mi libere esprimis mian opinion pri la afero en la asembleo, senfalante en la malmulte-kostajn kaptargumentojn por batalo aŭ insulto. Ne gravas personoj, gravas argumentoj. Kaj argumentoj endas decidojn.

Valensja esperantismo estas tre antikva kaj valora, kaj ĝi atingis altan nivelon. Ni ekstervalensjuloj provis kunlabori iomete en komuna agado. Monaj konsideroj devigis meti tiujn kondiĉojn en la statuton, sed socialaj uzoj en la asocio fakte ignoris ilin, kaj la afero funkciis bone dum kelkaj jaroj. Nun bedaŭrinde niaj vojoj devas apartiĝi. Mi dubas, ke politikistoj naciismaj monsubtenos valensjan Esperanton, sed tio ja povas ebli, kaj mi sincere deziras, ke ĝi okazu. Sed el sennaciisma paĝo de la bulteno de HALE mi nur povas promesi kunlaboron al integriga asocio, ĉu HEF, ĉu UEA, ĉu SAT, kie naciismo senvortiĝas iel ajn aŭ tute ĉiel.

Ĉu Esperanta retaĵo inter indiĝenaj popoloj?

Eĉ multkulturema Nederlandano ĝenus klopodante precizigi la loĝlokon de la sekvaj popoloj: Tlingit, Ŝor, Mapuĉe, Brunka, Masai, Dajak, Lumbe, Papuoj, Majaoj. Ja, ili vivas respektive en Alasko, Siberio, Ĉilio, Kostariko, Kenjo, Malajzio, Usono, Nov-Gvineo kaj Gvatemalo. Ĉiuj apartenas al la indiĝenaj popoloj, kiuj internacie en nenia maniero povas valorigi siajn rajtojn. Inter la nacioj por tiuj ne estas ejo. En 1945 Unuiĝintaj Nacioj estis fondataj, kies fonda akto sin apogas sur la nacio kiel jura persono kaj ne rekonas la diversecon de popoloj ene de unu nacio. Tiu difekto - postkonsidere - havadis multajn jurajn kaj faktajn konsekvencojn malavantaĝajn por la decidrajteco pri propraj aferoj kaj por la memkonservado de indiĝenaj popoloj. En diversaj manieroj oni provas en la lastaj jaroj adaptiĝi al tiu diverseco. Tiel funkcias ekde 1995 la «Internacia Jardeko por la Indiĝenaj Popoloj» de Unuiĝintaj Nacioj. Veriĝas, ke la regreso de iliaj kulturo, lingvo, ekonomia memsubtenado kaj natura medio firme daŭras sub la premado de kapitalismaj interesoj. Tiuj interesoj ofte estas subtenataj ankaŭ de la publikaj oficistoj de la landoj, al kiuj tiuj popoloj apartenas. Kiam la Kostarikano Jose Carlos Morales, membrante la Konsultan Grupon de la Jardeko, antaŭ du jaroj renkontis la direktorinon de la Nederlanda lingva institucio «Narwal», li deklaris, ke la plej granda problemo de sia popolo estas la komunikado eksteren. Tiu ovo estis kara (proverbo: Ovo estas kara, kiam venas Pasko) por la esperantula direkcio kaj ili elpensis planon por rimedi la izolitecon de la indiĝenaj popoloj. Tiu izoliteco povas esti duobla: al la aŭtoritatoj de sia lando, ĉar ili ne sufiĉe regas la nacian lingvon kaj al aliaj indiĝenaj popoloj en la mondo, ĉar tiuj uzas lingvojn malsamajn naciajn. Tamen granda nombro da indiĝenaj popoloj klopodas starigi internacian retaĵon, kiu devas helpi haltigi la neniigajn procezojn. Ili konscias pri la fakto, ke pli intensa interŝanĝo de konoj kaj spertoj helpas al la disvastigado de kreivaj kaj efektivaj alternativoj. La malesto de komuna lingvo kaj la limigita aliro al modernaj komunikiloj grande malhelpas ilin. La plano adoptis la nomon «Indiĝenaj dialogoj». Ĝi enhavas por 1999 du kursojn pri Esperanto por kontaktpersonoj de indiĝenpopolaj organizacioj. La unua kurso kun dudek unu partoprenantoj okazis dum la unuaj tri semajnoj de septembro. Dum la unuaj du semajnoj ili estas trejnataj legi kaj skribi (la parolado estas nur kromcelo) Esperanton. Sed altkvalita komunikado pere de Esperanto ne sufiĉas! Por maksimume profiti la uzadon de Esperanto kontraŭ malaltaj kostoj la partoprenantoj ankaŭ devus lerni - efektive utiligi retpoŝton kaj fakson - enkonduki la utiligon de ambaŭ teĥnikoj ene de siaj organizoj. Do post du semajnoj, kiam la komunikado estas ebligita, la enteno de la instruado direktiĝis al la regado de la komputilo kaj la aliro kaj uzado de Interreto.

Je la fino de la unua semajno la kursantoj ĝuis komunan esploradon tra la Wassenaaraj dunoj. Mi havis la plezuron ĉeesti kiel tradukanto elnederlanda, ĉar kompreneble la elpaŝo ne nur intencis konatigi la kursanojn kun la restaĵoj de la Nederlanda naturpejzaĝo. Ĝi estus ankaŭ elprovo ĉu ili povus interkompreniĝi kun Nederlandaj esperantoj. Dum tiu tago mi parolis kun tri el la dudek unu partoprenantoj. (La kursantaro konsistas el du enloĝantoj de Nov-Gvineo, kvin membroj de Rusiaj minoritatoj, unu nord-amerika indiano, ses latin-amerikaj indianoj, unu berbero el Maroko, du enloĝantoj de Ruando kaj du de Burkina-Faso, du bharatanoj.)

La unua intervjuo estis kun Fati, 26-jara virino de la tribo Tuarega. Tri milionoj kaj duono da tuaregoj dise loĝas en kvin landoj: Burkina-Faso, Malio, Niĝerlando (ne intermiksenda kun Niĝerio), Alĝerio kaj Libio kaj partoprenas la saman kulturojn kaj lingvojn. En ĉiu lando ili konsistigas po minoritato (malpli ol 10%, escepte de Niĝerlando). La organizacio, por kiu Fati klopodas en ŝia libera tempo, laboras ekde 1997 por la alfabetigado, klerigado kaj faka instruado de la nomadinoj. 90% el ili ne povas legi kaj skribi. La kulturo de la tuaregoj estas grave minacata, inter alie ĉar la

respektivaj registaroj ne permesas kontaktojn kun tuaregaj organizacioj trans la bordo. Fati plene fidas, ke la korespondado per elektronika poŝto en Esperanto prosperos. Ĉiukaze Internet ebligos al ili kontakti senĝene parencajn organizaciojn tuaregajn en la najbaraj landoj.

Raymond Sensmeier estas usona indiano el Yakutat, Alasko. Li estas deputito de la popolo 'Tlingit', unu de la ses Indianaj popoloj en Alasko. Lia tribo nombras 22 000 homojn. La indiĝenaj popoloj en Alasko estas minacataj de la oleborado, la arbarsegado kaj la sportfiŝkaptado. La kulturo de ĉi-tiuj indianoj pereus, se ili komplete dependiĝus de la moderna monekonomio. Por sia kultura kaj socia postvivado ili devos povi je difinitaj periodoj subteni sin per la ĉasado de alkoj, rangiferoj, fokoj kaj per fiŝkaptado. Problemas, ke la indianaj vilaĝoj pro leĝo de la jaro 1971 asigniĝis multe tro limigitan ĉasterenon. Vilaĝo de 600 enloĝantoj ekz. ricevas nur 9200 hektarojn. Kompreneble ĉi-tiu terenasignado estas direktita por doni liberan agpovon al la grandaj oleboraj kaj arbarsegaj kompanioj en la lando. Neprimireble la pormedia movado estas signifa aliancano de la indianoj. Raymond ire-returne dum dudek jaroj prezidis 'Alaskan Native Brotherhood and Sisterhood' (Gefrata Kongregacio de Indiĝenaj Alaskanoj). Kiel tia li faris prelegojn en la Universitato de Alasko, en Virginia Beach okaze de la tie pasinta Saniga Konferenco pri Patrino Tero kaj ĉe la Universitato de Kopenhago.

Pli poste en la tago, dum la pikniko sur la Scheveninga strando mi parolas kun Olga Torres Ortiz el Kostariko. Olga estas librotenistino kaj administra asistantino de 'Asociación Regional Aborigen (= indiĝena) del (regiono:) DIKES'. Ĉi-tiu organizacio alstrebas la disvolviĝon kaj aŭtonomion de la indiĝenaj popoloj en ses 'rezervejoj'. Ŝi faras tion helpante la ordinarajn homojn defendi siajn rajtojn kaj entreprenojn, kiuj baziĝas sur la protektado de la kultura kaj ekologia medioj. ARADIKES ricevas neniun oficialan subvencion. Ĉar en nombro de Latinamerikaj landoj ankoraŭ cirkonstancas, ke la gvidantaro estas dominata de kreoloj, la (koloritaj) posteuloj de europanoj. Ankoraŭ por ili indianoj ofte estas pigraj kaj malinteligentaj. La kreoloj por si faciligis la vivon, postulante la proprecon de la plej bone kultureblaj terenoj. Per tio la indiĝena loĝantaro estis plupelita en la montojn. Sur la tiea malfekunda tero ili kulturas siajn tradiciajn kreskaĵojn: fabojn, rizon kaj maizon por sia uzado. Kaŭze de la influo de la eklezio pri la familia vivo kaj de la ŝtato pri la lerneja sistemo la socio ricevis strukturon en kiu regas rasismo de kreoloj kontraŭ indianoj. La organizacio de Olga strebas interalie al subtenado de la indianaj virinoj en la establado de propraj entreprenoj. Financa subteno por tio venas el eksterlando. Ankaŭ Olga estas konvinkita pri la signifo de ĉi-tiu projekto. Ŝi volas scii, kio okazas en la cetera mondo por rompi la hegemonion de la superregantaj kulturoj.

Mi parolas ankoraŭ kun pliaj partoprenantoj de la duna ekskurso kaj miregas pri ties sindediĉo. Ĉiuj sin sentas morale bone subtenataj de la komunumo, por kiu ili klopodas.

Mi dezirus scii ankoraŭ pli pri ĉi-tiuj batalpretaj homoj, sed la tago alfiniĝas. Homo el Manipuro kantas dum la vesperiĝo pri amorada sceno. Eble ĉe liaj proksimuloj hejme li ne estus tiel senĝena, sed ĉi tie ja neniu lin komprenas. Berbera junulo sin prezentas per evidente tre komika moka kanto. Sekvas lin kvin hispanlingvuloj, kiuj dum multe da sia rikanado aŭdigas siajn aŭdacaĵojn. Neniu kantas en Esperanto. Tio ankoraŭ ne eblas kaj ne necesas.

Nature la starigitaj en Wassenaar kontaktoj estos daŭrigataj post la foriro de la partoprenintoj al la hejma ariero: pere de retpoŝto kaj fakso. Tio estas la unua paŝo sur la vojo al la tria celpunkto de la projekto: la enkonduko de la uzado de retpoŝto kaj fakso ene de la organizoj. La projektmastroj intencas trejni 250 kontaktpersonojn antaŭ 2005. Ili esperas, ke dumtempe la Indiĝenaj Popoloj estos konstruintaj fortan kaj dinamikan retaĵon de proksimume ducent organizojn, kiuj povas en Esperanto komuniki rapide. Per tio ili estos rompintaj sian izolecon. Sed la estrada vizio streĉiĝas plue: Dank'al sia virtuala interkultura indiĝena

Daŭrigas je paĝo 11-a

Intervjuo

La Prezidanto de la Germana Esperanto Asocio

Doktoro Rainer Kurz vizitis Mursjon la 7-an de januaro ĝis la 9-a. Ni ĉiĉeronis, gastigis kaj ĝuis lian kuneston dum tri tagoj. Sabaton la 8-an, ĉirkaŭ glasoj da biero en trinkejo Kandela, ni intervjuis lin pri siaj opinioj kaj spertoj kiel esperantisto kaj prezidanto de la Germana Esperanto Asocio.

Kiam kaj kial vi esperantistiĝis?

Mia unua lingvo estas ŝvaba, kiun parolas kvin milionoj da homoj. Sed poste mi lernis la oficialan germanan por paroli kun cent milionoj da homoj. Poste mi investis en la angla lingvo. Mi estis en uson-germana asocio *Metropolitan Club* en Ŝtutgarto. Tiel mi povas paroli al pli ol kvin cent milionoj da homoj. Mi ne kapablis paroli, tamen, al miaj najbaraj francoj, kiuj loĝis naŭdek minutoj for de mia urbo aŭtomobile, tamen. Mi demandis min, *ĉu ekzistas solvo pri la monda problemo, tiel ke mi povus paroli al ĉiuj?* Mi rimarkis, ke ne ekzistas solvo, sed vizio. Mi iomete sciis pri Esperanto, kaj kiam okazis informprelego pri ĝi, mi volonte iris al tiu. Tio estis en 1987. Poste mi lernis la lingvon, ĉefe por kontribui al la ideo, kaj mi rimarkis ke Esperanto havas personajn avantaĝojn por mi: tial, kiam mi studis en Japanio, mi ekuzis Esperanton por ekkoni tiun landon sukcese.

Post mia sperto en Japanio, mi decidis uzi Esperanton, ofte regule, en eksterlando.

Ĉu la Kongreso de Berlino impulsis la movadon en Germanio?

Multaj viglaj helpantoj elĉerpigis siajn fortojn dum la kongreso, sed tio kaŭzis la ŝancon de interŝanĝo persona kaj homa inter la germanaj esperantistoj. Kutime ĉirkaŭ cent esperantistoj renkontas ĉe niaj kunvenoj germanaj, sed en Berlino venis pli ol kvin cent. Certe, kelkaj laciĝis troe pro la kongreso, kaj nun ne volas scii pri pluaj kongresoj, sed tio estas anekdota kaj ili pluvivos ĝin. Fakto grava estas, ke oni verkis pli ol 300 artikolojn en germanaj gazetoj pri Esperanto antaŭ kaj dum la Universala Kongreso de Berlino. Ties rezultojn ni jam vidas: kelkaj homoj jam venas al Esperanto en Germanio, kvankam bedaŭrinde mi ankoraŭ ne havas ciferojn pri tio.

Kiuj estas la reagoj de germana socio post la Universala Kongreso de Berlino?

Multaj germanoj ekkonis pri Esperanto per amasmedioj laboraj, kaj poste demandis pri Esperanto. Ankaŭ la politika tavolo denove rimarkis, ke Esperanto ekzistas, eĉ sukcese, kaj la antaŭa prezidanto de Germanio, Roman Hertzog, estis la prezidanto de la Universala Kongreso, kaj ties organizantoj ricevis inviton de la urbestro viziti la Urbodomon de Berlino.

Diru al ni pri la celoj de la Germana Asocio de Esperanto.

Unue, daŭrigo de la konstanta laboro kaj servoj; due, krei novajn servojn por la membroj, tiel la membreco estos inda por ili pro starigo de prelegoservoj por la lokaj kluboj, kreado de specialaj servoj, kaj impoŝtaj servoj por membroj; kaj trie, krei kaj vivi la bildon de Germanio kiel aktiva kaj moderna asocio.

Kiom da grupoj konsistigas la Germanan Asocion de Esperanto?

La strukturo estas jena: ĉiu el la 16 federacioj ŝtataj de Germanio havas sian federaciŝtatan asocion. Ene de ĉiuj el ili ekzistas kelkaj urbaj grupoj. Ĉiu membro apartenas al iu federaciŝtata asocio kaj povas aparteni al urba grupo (ne ĉiam). Membroj kun malpli ol 26jaraĝo apartenas al la Germana Esperanto Junularo. Entute la Germana Asocio havas 1500 membrojn, kio faras ĝin la plej granda esperanta asocio el la tuta mondo.

Ĉu estas multe da malfacilaĵoj enkonduki Esperanton en lernejojn en Germanio?

Jes. Ĝis nun la germanaj esperantistoj sukcesis krei libervolajn lernogrupojn en lernejoj, sed oni ne sukcesis krei ekzamenvaloran kurson. Ekzistas multe da misinformo pri Esperanto. Ekzemple, oni kredas, ke oni ne povas paroli Esperanton. Ankaŭ mankas al ni bonaj instruistoj. Ankaŭ ĝenas la aktivado de kelkaj troaktivuloj, kiuj kreas bildojn pri Esperanto kiel lingvon por frenezuloj.

Kiaj rilatoj estas kun la Germana Laborista Esperanto Asocio (LEA)?

Ne estas speciala kontakto. Ne ekzistas komunaj agadoj.

La estraro de la Germana Esperanto Asocio estas juna. Ĉu okazas renoviĝo generacia je la estraroj de grupoj de Esperanto en Germanio?

Ne. La aktivaj esperantistoj estas junaj aŭ estas spertaaĝuloj en kampoj post la labora periodo de la vivo. Ŝajnas, ke homoj, kiuj staras en la laborvivo aŭ kreas famlion havas malmulte da tempo.

Interredaktore

Kiel novajara donaco, la reta eldono de Rok-gazet' proponas al ĝiaj legantoj sep MP3-dosierojn, kun po unu kanto el la sep ĝisnunaj diskoj de Kolekto 2000.

La reta Rok-gazet' legeblas ĉe:

http://www.sciuro.demon.co.uk/rokgazet/

Ĝuu, kaj bonan novan jaron!

Duncan Thomson
<thom-ci0@wpmail.paisley.ac.uk>
fonto: ret-info

Pri Prezidanto de VEF

Kun granda surprizo legas mi la leteron, kiu samideano sendis al ni, per kiu li diras, ke la kongresanoj kiuj partoprenis en Requena (pron. rekena) surprisiĝis pri tio, ke vi nek partoprenis nek sendis leteron kiel Prezidanto de VEF.

Mi devas diri, ke mi ne estas Prezidanto, ke dum la Kongreso de Lorko, la asembleo elektis novan Prezidanton, kaj tiu Prezidanto estas Aŭgusto Casquero de la Cruz. Dum la kultura semajno esperanta, kiu okazis en Cambrils (pron. kambrils'), Taragono, mi transdonis la libron de protokolo kaj aliajn dokumentojn de nia Federacio al nova Prezidanto Aŭgusto.

Antaŭ du semajnoj mi sendis al la nova Prezidanto aliajn dokumentoj por fari la historion de VEF.

Kiam mi atingis la Prezidantecon, mi havis propran programon: 1-e Datumbazo Lidia, 2-e apogoj al pioniroj, 3-e VEF en Interreto, 4-e ekhavi monon ne kotizinte al la asocio.

Mi reliefigas la sukceson de la datumbazo, kiu ebligas, ke ni faru konkretan politikon pri simpatiantoj kaj lernantoj.

Ankaŭ mi malsukcesis kiam mi proponis al la Asembleo, ke oni apogu pionirojn per stipendioj, sed ĝi rifuzis mian proponon.

Per tio ĉi min surprizas, ke la vefanaro demandis sin, kie estas Prezidanto Johano Antono, ĉar mi ne estas la Prezidanto

Ni ĉiuj apogu la novan Prezidanton.

Johano Antono
Cabezos Martínez

Ĉu esperanta retaĵo..? Venas el paĝo 9-a

universitato ili devas lerninti unu de la aliaj kiel ekzemple konservi sian lingvon, kiel kontroli la plenumadon de traktato, kiel protekti siajn intelektulajn rajtojn aŭ ekologian medion. Plue devos esti establata organizacio de la «Unuiĝintaj Indiĝenaj Nacioj», kiu postulos komprenon kaj respekton pri la rajtoj de la indiĝenaj popoloj.

Mi daŭre serĉas onklojn, traduk-emulojn kaj subtenantojn por la projekto.

Amikaj salutoj al vi ĉiuj:

Katalin Smidelivsz

Gladiator, 2000

Ĉu ignoro, pedanteco aŭ insulto?

La finfina filmo pri romianoj ŝajnas nur moko. Mi neniam vidis filmon pri tiu temo, kie ne estis eĉ unu via romana. Generalo Maksimo Meridio loĝas en Emerita Aŭgusta, Hispania Ulterior. Kiam li preskaŭ mortas pro la ŝoko vidi sian familion murdaĉitan, kaptas lin preterpasantaj muslimoj! Nu, muslimoj ne aperis en la Iberia Duoninsulo ĝis 500 jaroj poste (fakte ne estis muslimoj ĝis 300 jaroj poste)..

Daŭrigas je paĝo 16-a

Intervjuo al Ivo Pejrot', Prezidanto de SAT.

Kiam kaj kial vi esperantistiĝis?

Mi esperantistiĝis en 1950, preskaŭ antaŭ duonjarcento, kiam mi estis liceano en la antaŭlasta klaso, ĉar dum tiu tempo en Francio la Abituriento okazis sur du diversaj jaroj, do mi esperantistiĝis dum la jaro kiu estis antaŭ la unua abituriento, do tiutempe mi estis 16-jaraĝa.

Kiun jaron vi iĝis membro de SAT, kaj kiel?

Kiam mi kontaktis la Esperanto-Movadon mi estis tre juna, kaj mi estis membro de la junulargastejo movada, kiu estis tre vigla en Francio, kun multaj junuloj kiuj mastrumis siajn proprajn feriojn, kaj tiel plu, kaj en tiu medio ni havis ĉiujn malvirtojn (vivis trockistoj, komunistoj, anarkiistoj, kooperativanoj, esperantistoj..., do multaj diversaj tendencoj de la laborista movado ĝenerale, kaj la grupo, kiun mi aliĝis unue estis grupo kiu estis de SAT-amikaro kaj de SAT, kaj dum tiu momento mi aliĝis al SAT pro amikeco, ni diru. Sed ankaŭ ĉar la movado tre plaĉis al mi. Ankaŭ post kelkaj monatoj mia profesoro, kiu estis masonisto, estis tre honesta persono, kaj li diris al ĉiuj kursanoj: ekzistas SAT-amikaro, ekzistas SAT, sed ekzistas ankaŭ aliaj organizoj, kaj li montris al ni multege da diversaj gazetoj, kaj li klarigis rezume la vivon kaj ekziston de praktike ĉiuj esperantaj asocioj, por ke ni povu mem elekti tute plenkonscie posedinte ĉiun necesan informon. En 1952, jam 18-jaraĝa, mi finis la licean periodon de mia vivo, mi partoprenis mian unuan SAT-kongreson en Duseldorfo, kaj la postan jaron mi ĉeestis la Universalan Kongreson organizita de UEA en Zagrebo, kaj eĉ unu jaron poste mi estis en la kongreso de UEA en Nederlando. Tiel, oni provizis al mi sufiĉe da kono pri multaj asocioj esperantistaj, kaj kvankam mi neniam diris aŭ pensis kontraŭ iu ajn el ili, mi devis kompreneble elekti inter ili, kaj SAT kaj SAT-amikaro estis plej proksimaj al miaj personaj pripensaj ideoj.

*Laŭ **Sennaciulo** estas redukto en la perdo de la rimedoj de SAT. Kio estas la kaŭzo, laŭ vi?*

*SAT akiras monon per du aŭ tri manieroj: la unua kaj plej simpla fonto estas la kotizoj; la dua fonto estas la donacoj, ĉar maljunaj kamaradoj akumulas iom da mono kaj donas sufiĉe gravajn sumojn al SAT. La tria fonto estas la vendo de la fama vortaro PIV, ĉar ĝi estas la sola kiun uzas la Esperanto komunumo, kaj ĝi estas tre valora, kaj ni tre fieras pri tio. Ni vendas sufiĉe multekoste kaj tiel ni gajnas iom da mono.Tiu la tria fundfonto ne malgrandiĝis: ni vendas regule 1300, 1500 ekzemplerojn de **Sennaciulo** ĉiujare. Pri la donacoj ni ne povas plendi ankaŭ ĉar regule malavaraj kamaradoj*

kontribuas al la financoj. Sed pli kaj pli SAT perdas siajn membrojn, do perdas kotizojn, kaj interalie nun la duono de la membroj de SAT vivas en orientaj landoj. Tie la laboristaro vivas mizere, kaj do ili pagas minimuman, simbolan kotizon, kaj tiuj membroj kostas monon al SAT, ĉar iliaj kotizoj ne kovras la koston de la afranko por sendi al ili la revuon. Sed SAT decidis, pro solidareco, daŭre sendi al ĉiuj la gazeton eĉ se ili ne havas monon, kaj do, aldone al tio, ke la nombro de membroj konstante regresas, ni havas konstantan deficiton, kaj ni povas vivi ĉar estas kelkaj kamaradoj kiuj donas multege da mono.

Dum kiom da jaroj povas SAT elteni perdojn?

Dum la kongreso ni tion bildigis. Ankaŭ mi dirus, ke dum tri jaroj maksimume, kun la sama sistemo: tio estas, ke nuntempe la plej grava sumo, kiun ni elspezas, estas la salajro de nia dungito, Kreŝo. Ni ne maldungos lin, kompreneble, sed li iam atingos la aĝon de emerito, kaj do ni ne plu pagos salajron al li. Sed, laŭ mi SAT povos verŝajne vivi ankaŭ vivi longe per alia stilo, per alia maniero, kiu estas ke ĉiuj taskoj: redaktado, ekspedado, adminstrado, kaj tiel plu, ĉiuj taskoj estu farataj nur de bonvolemuloj. Tiel, do, se ni trovas kamaradojn kapablajn kaj bonvolemajn, ni povos daŭre vivi!

Ĉu SAT estas ankoraŭ tia, kia Lanti fondis ĝin, laŭ vi?

[Ivo ridas] Nu, mi naskiĝis multege da jaroj post tiam, do mi nur havas hipotezon pri tio. Laŭ mi, jes, pri kelkaj punktoj. Pri aliaj, ne. Pri la Statuto, krom detaletoj, ĝi ne ŝanĝiĝis. La celo mem de SAT, tio estas, ke ĝi estas kleriga asocio, ankaŭ ne ŝanĝiĝis. Tio, kio ŝanĝiĝis estas, ke la membraro ne estas tiel multnombra, kaj ankaŭ ŝanĝiĝis la fakto, ke ni ne plu vivas en la sama mondo. La mondo de la epoko de Lanti ĝis la Dua Mondmilito, eĉ ĝis la falo de la Muro de Berlino, estis ke ni vivis en mondo dividita en du partoj. Tio estas ankaŭ malvera, ĉar ĉiuj forgesas ke ankaŭ ekzistas Ĉinio, Vietnamo, kaj Nordkoreio, kiuj estas ankaŭ bolŝevikaj. Sed videble tiu bloko ne aktivas eksterlande: praktike vivas sur si mem.

Sed dum la periodo de Lanti kaj postaj jaroj, estis dividita en du partoj kaj la esperantistoj kaj la satanoj devis sindetermini rilate tiun dividon inter du mondoj. Sen la Muro de Berlino la mondo ne plu estas tiel. Tial, same kiel maldekstraj partioj ni devas reĝustigi niajn punktojn por daŭre antaŭeniri sur la vojo de socialismo kaj se ni vidas nun niajn malfacilaĵojn, ne nur en SAT, sed en la maldekstrularo, estas ke kiam ĉi tie ni estas nuntempe, ni sidas en unu el la ekssovetiaj landoj, tiam oni parolas pri socialismo al iu ajn, tuj en la menso de tiu, kiu aŭskultas, tio referencas al tiu abomena reĝimo, kiu estis tie longe. Do pro tio estas ege malfacile konvinki niajn nuntempajn individuojn kiuj estas ĉirkaŭ ni, pri tio, ke la socialismo povas esti idealo daŭre vivanta, daŭre valora,

Lanti

ĉar tro postrestas en la spiritoj, la memoro pri kio dum 57 jaroj regis la komunismo, la vulgara stalinismo.

Ĉu vi opinias, ke la spirito de SAT estas anarĥia en sia vera senco, aŭ alia: sociisma, aŭ kia?

Eĉ mi povis respondi iom diplomate, ke anarĥio en sia vera senco, mi ne kuraĝus difini tion. Sed mi respondos en pluraj facetoj.

Se ni aludas al la anarĥiista movado organizita, kiu ekzistas en diversaj organizoj tra la mondo, ĉu anarĥiistaj, ĉu anarĥosindikatistaj, SAT estas proksima de tiuj organizoj, sed ĝi ne sindeterminas kiel anarĥiista. Kaj la anarĥiistoj, kiuj estas membroj de SAT estas sufiĉe multnombraj. En SAT estas nur SATanaoj. Ili ne kaŝas siajn opiniojn, eĉ vi scias, ke estas liberecana frakcio kun bulteno, kun eldonoj de tempo al tempo.

Due, pri la funkciado de SAT, ĝi vivas daŭre sur la tiel nomata demokrata sistemo. En niaj kunvenoj ni uzas la metodon de la klasikaj parlamentoj: plimulto, malplimulto, ktp. Kaj tio estas malsimila al la funkciado de multaj anarĥiistaj asocioj, kie oni serĉas unuanimecon. Oni serĉas kune la plej bonan solvon, por ne voĉdoni, ĉar tio havas sencon. Hieraŭ ni partoprenis alian forumon de alia organizo kiu, paralele al nia kongreso, kongresis en la sama loko kiel ni, kaj pri iu teksto baza, kiu estis ellaborita, ili havis tre bonan metodon: kiam pri temo estis du opinioj, en la teksto oni metis la du opiniojn. Tiu indikas, ke ne estas la plejmulto kiu pravas, sed ke pri grava problemo estas diversaj opinioj.

Pri nia lasta demando, kiu tute ne rilatas al SAT, sed al la politiko de la hispana CNT dum la revolucia periodo, oni riproĉas, ke CNT havis kvar ministrojn, sed oni debatis multe ĉu havi aŭ ne ministrojn. Estis dure, kaj finfine oni agnoskis, ke estis du frakcioj kiuj volis kaj du aliaj frakcioj, kiuj ne volis tion.

Futuraj planoj de SAT.

Dum la restantaj kunsidoj ni diskutos pri futura agado. Ni lasos respondon. Gvidrezoluzioj estos tiaj pluraj. Tiel funkcias SAT.

La provizordugaj per-entreprenoj (P-Poj)

La provizordugaj per-entreprenoj montras la plej kruelan kaj malmildegan vizaĝojn de la sovaĝa kapitalismo, kiun ni suferas en Hispanio. Jen laŭleĝa trafikado pri malmultekostaj laborfortoj daŭrinta ekde la laborreformo de 1999-a leĝigita de estraro de PSOE (Hispana Socialisma Laborista Partio). La provizordungaj per-entreprenoj nek produktas ion ajn mem, nek estigas riĉecon aŭ bonfarton sociajn, ili nur prikomercas kaj trafikas pri la hispanaj laboristoj. Sia funkciado estas tre simpla. Ili estas multnaciaj entreprenoj, kiuj peras inter la entreprenoj serĉantaj laboristojn, kaj tiuj ĉi, kiuj ofertas siajn laborfortojn. Tiel ĉi la necesoj de la entreprenoj estas kovrataj sen pagi ion al la laboristoj, ĉar tiuj ĉi ricevas siajn salajrojn el la provizordugaj per-entreprenoj, kaj tiuj ĉi ankaŭ respondecas pri la aniĝo de la laboristoj al la asekursistemo socia. La salajroj tiel ricevotaj de la dungitoj estos multe malplikvantaj ol tiuj de siaj samentreprenanoj, ĉar la provizordungaj perentreprenoj kelkfoje retenas eĉ 40-pocenton el la pagotaj salajroj. Se iu entrepreno ne estas kontentigita, ĝi petas tuje kaj senpage la anstataŭigon de la dungita laboristo. Se iu laboristo malsaniĝas aŭ suferas akcidenton laboran, la koncerna provizorduga per-entrepreno sendas aliulon senzorge al la suferinto. La problemoj tiel estas ĉiam por la dungitoj senditaj de la provizorduga per-entrepreno.

La ĉefa problemo stariĝas kiam tiaj peradoj kunportas la kunkomplicecon de la Ŝtato, de INEM (hispana lingva mallongigo de Hispana Pordungiga Instituto) kaj de la majoritataj sindikatoj. Tian peradon petas la privataj entreprenoj pro la neefikeco de INEM, kiu ne trafas solvi la necesojn de la lando kaj siaj senlaboruloj. Ne pritaksante la validecon aŭ la socian maljustecon el kiuj konsistas la provizoraj laborkontraktoj, la provizordugaj per-entreprenoj estis kreataj por kovri malplenon kiun ne kovris INEM. Kvankam en ŝtato sekvanta la doktrinon falagisman ne esus ŝancoj por la provizoreco ded la kontraktoj, la ŝtato forta garantius la senpagan funkciadon de INEM, tiel la provizordugaj per-entreprenoj tute malaperus kaj la laboristoj ricevus siajn kompletajn salajrojn. Tio ĉi ebligus multajn gejunulojn fari planojn por sia estonteco kaj formi familiojn kun iom da sekureco.

Alia punkto prikalkulinda estas tiu de la kunkompliceco de la majoritataj sindikatoj, kiuj nur defendas siajn mizerajn interesojn kaj privilegiojn. En akordo rubrikita de tiuj kun la mastraro, oni klarigas ke la provizoraj laboristoj ne povas esti reprezentataj de la sindikatoj ene de siaj koncernaj entreprenaj komitatoj, tial ili restas sendefendaj antaŭ la mastraro kaj siaj kunuloj. La menciitaj homoj povas esti maldungataj, anstataŭataj, aŭ kontraktataj akorde kun la produktado kaj la entreprenistaj celoj, senkalkulinte kun ili kaj sen havi la rajton esti reprezentataj. Tiel ili konsistigas la solan laboristan konletivon, kiu ne havas tiun rajton en

Hispanio. La provizordungaj per-entreprenoj estas disvastiĝante kvazaŭ pesto. Ekzistas en nia nacio pli ol cento da ili, kaj siaj profitoj kreskas po 50 pocento ĉiun jaron. Kutime ili estas entreprenoj apartenantaj al grandaj entreprenistaj grupoj; kelkfoje multnaciaj; aŭ al bankoj. Ties laboristoj ĉiam estas kontraktataj laŭ la plej malaltaj kategorioj de la sindikatmastraj interkonsentitaj normoj, kaj fakte ili neniam faras la taskojn specifitajn en siaj kontraktoj. Estas kutimaj kaj trouzaj praktikoj kiel fari ekstrajn laborhorojn kaj se iu rifuzas tion fari sia mastro ĝin anstataŭas tuj, kaj tiel finiĝas la konflikto. Rubrikite la ĝenerala sindikatmastra interkonsentita normo, tiuj ĉi laboristoj havas malhelpojn por komplete enspezi siajn finkontraktajn monsumojn, ekstrajn pagojn, kaj feripagojn.

Ni devas denunci tiajn faktojn kaj proponi kelkajn solvojn. La anstataŭo de tiaj ĉi kontraktoj per aliaj pli dignaj, kaj la malpermeso al la entreprenaj praktikoj de provizordugaj per-entreprenoj anstataŭante ilin per efika agado de INEM estas kelkaj el la solvoj. Sed dum iom da tempo la bojkotado al tiaj ĉi entreprenoj kaj al ties sidejoj, estas ankaŭ agado pritaksinda. Ni avertu ilin.

Fernando Letamendia

Venas el paĝo 11-a: *Ĉu ignoro..?*

Mi iris en kinejon ĉefe por ĝui historiajn pejzaĝojn kaj etoson, sed mi trovis nur ridindigan karikaturon pri pli bona filmo, La disfalo de la Romia Imperio, farata de Samuel Bronston en 1964. Tie ni povas vidi nebrilan Stifen Bojd ludante Livius, deinfanaĝan amikon de Imperiestro Komodo, ludita de Kristofer Plumer, kaj decan Sofian Loren, ludante Lucilan, filino de Imperiestro Marko Aŭreljo, la imperiestro filozofa.

Ambaŭ filmoj montras, ke kino ĉiam mensogas. Ne nur Maksimo Meridio (pleja tagmezo) ne ekzistis, sed Gaius Martelus Livius (gaja martelo de vivo) ankaŭ estas elpensaĵo. Laŭ ambaŭ filmoj, Marcus Aŭreljus estis mortigita rekte de Komodus (Gladiator) aŭ de ties kapitanoj (La disfalo...), sed post mallonga tempo (ĉirkaŭ jaro) la bonulo glavmortigis la novan imperiestron en holivuda defio. Historio diras aliel: Markus Aŭrelius regis dum 19 jaroj (de 161 ĝis 180), sed Komodo (komforta) regis de tiu ĉi jaro ĝis 192, je kies lasta tago luktisto (ne gladiatoro) stranglis lin. Sed jam en la jaro 177-a Marko Aŭreljo estis nominta lin kun-imperiestron, kaj tio kontraŭdiras la startpunkton de ambaŭ filmoj.

La falo de la Romia Imperio, 1964

Daŭrigas en paĝo 18-a

La nova edukado ne funkcias

Mi laboras kiel instruisto pri Historio en la Komunumo Aŭtonoma de Mursjo. Edukado en Hispanio ne funkcias, kaj same okazas en aliaj landoj. En Britujo la edukado produktas *hooligans* (huli gans, senbriduloj) kaj en Francio la principoj laikaj retroiras antaŭ la principoj religiaj.

Kio okazas?

En Britujo, lando klasisma, per la edukado malunuiĝas la soci-klaso. Pro tio la gefiloj de la malriĉuloj havas malbonan edukadon. La edukado produktas senbridulojn, personojn malklerigitajn, kun malbonaj dungoj.

Kio okazas en Francujo? La francaro konas la gravecon pri soci-inteligento. Ili komprenas, ekde Saint Simon (pron. sensimon') kaj la III-a Respubliko, ke la bona edukado signifas, ke la lando estas grandega.

Sensimon' estis aristokrato, kiu loĝis en Francio dum la Franca Revolucio. Li skribis: *se Francio perdus la unuajn 50 ĥemiistojn, la unuajn advokatojn, entreprenistojn, laboristojn, terkulturistojn, kaj tiel plu, Francio perdus unu aŭ du generaciojn, sed se ĝi perdus episkopon de Parizo, ĝi nenion perdus.*

La Tria Respubliko estas la respubliko de profesoroj, tiam Francio atingis altan nivelon pri kono kaj per tio ĉi estas la epoko preskaŭ de oro de la literaturo kaj de la dua imperio de Francio.

K-do Marco Botella komentis, ke post la intercivitana milito en Hispanio li estisenkoncentrejo en Nordafriko. Tie la francoj elektis al la personoj, kiuj estis kuracistoj, advokatoj, profesoroj, kaj k.a.s. (kaj aliaj similaj) kaj ili estis ili restis tie, sed la personojn, kiuj estis malsciuloj, la francoj redonis al Diktatoro Franko. Kaj multaj el ili forpasis en la Franka Hispanio. Nia kamarado Marco Botella savis sian vivon pro tio, ke li instruis Esperanton en la koncentrejo. Li estis instruisto, li vivas pro tio, ke li estis kaj estas esperantisto.

Tiu ĉi ideo, ke la bona edukado signifas granda lando, ne plu funkcias en Francio, kiam la publika lernejo devas akcepti, ke personoj povas partopreni en la lernejo kun vualo. Ili komencis unue la vualon, poste diros ili, ke la edukado pri sekso ne estas bona por ili, ke la demokrataj principoj ankaŭ ne estas bonaj por ili, ĉar ili estas religiaj personoj, kaj tiel plu.

En Hispanio ankoraŭ ne estas problemoj pri islama religio, sed ni havas problemojn pri ciganoj. Ili diras, ili ne volas iri al la lernejo, ĉar ĝi ne estas demokrata, ĉar oni ne respektas iliajn morojn tie.

Kiujn morojn ne respektas la lernejo? La lernejo ne respektas morojn, kiuj ne estas demokratiaj, kiel ekzemple tiu pri ekzinigo de filinoj dekkvarjaraĝaj, aŭ tiu pro kiu gepatroj ne permesas al sia filino ĉeesti ŝian klason kiam ŝi menstruas.

Ĉu devas la lernejo respekti morojn, kiuj estas kontraŭ homaj rajtoj? Mia respondo estas, ke ne, kaj se ni akceptas kiel demokrataj la morojn, kiuj estas kontraŭ la homaj rajtoj, fine mi devas akcepti koncentrejon kaj pafadon kiel maniero solvi la problemojn de iu lando.

Alia problemo en niaj lernejoj estas perforto. Mi laciĝas aŭdi en mia laborejo, ke perforto ekzistas, ĉar la socio estas perfortema. Mi pensas, ke se estas vere, ke ne estas perforto en socio, tamen io veras, la vero estas, ke la nova edukado ne funkcias. En tiu malnova edukado la baza lernejo instruis pri latina kaj greka lingvoj, historio, literaturo kaj matematiko. La abituriento estis tre longa, mi konis ĝin kiel sepjara, sed nek la lernejo nek la liceoj instruis sufiĉe da latina aŭ greka, historio, literaturo aŭ matematiko, kaj tial edukado ne funkciis. Mi studis abiturienton dum sep jaroj, poste estis kvar jaroj por abiturientiĝi (kaj komencis problemon en hispanaj liceoj aŭ bazaj lernejoj) kaj post la lasta reformado pri edukado, la nuna abituriento estas nur du jarojn longa.

La nova sistemo pri edukado en Hispanio elradikigas demagogion sisteman en tio, ke ĝi postulas, ke gepatroj devas partopreni en la lerneja vivo. Sed gepatroj ne volas, ke siaj gefiloj konu, ili nur volas, ke ili sukcesu pri siaj kurso eĉ sen studi. La lernantoj povas sukcesi sen studi, kaj el tio sekvas, ke la lernantoj enuas sin en lernejoj, kaj sekve aperis la lasta novaĵo: *geinstruistoj devas amuzi la lernantojn*. Tio signifas, ke oni devas agi kiel klaŭnoj.

Tiu sistemo havas la nomo de *edukado pri valoroj*. Kiam mi studis, la voloroj venis per la latina lingvo, per historio kaj literaturo, kaj miaj profesoroj instruis min sen amuzi min.

Nur la edukado por la gefiloj de la malriĉaj devas amuzi kiel en la empiro romia, kiam al la popolo la romianoj donis panon kaj cirkon.

Mi ne volas edukadon por malriĉaj, mi volas bonan edukadon. En alia artikolo mi skribos kiel estas la edukado por la gefiloj de la riĉaj.

Venas el paĝo 16-a

Post Komodo, la nova imperiestro estis Publius Helvius Pertinax (obstina), sed

Pli fidinda Komodo (Kristofer Plumer)

soldatoj mortigis lin tri monatojn poste, kaj baldaŭ la Imperio estis sub intercivitana milito. Do, oni povas konsideri, ke post Marko Aŭreljo (kadro de oro) vere komencis la disfalo de la Romia Imperio, kiel la titolo de nia dua filmo konsiderata diras. Fakte, tio estas preskaŭ la sola vero en tiu filmo. Kial oni mensogas tiom abunde kaj ofte en kino? Bone, tion jam respondis antaŭ multaj jaroj direktoro John Huston (ĝon hjustn): kino estas negoco, ne arto. Se filmo gajnas monon, tio estas bona filmo, se ĝi ne gajnas monon, ĝi ne estas bona filmo. Kaj pri la afero restas nenio pli.

Danĝero estas, ke la publiko kredas tiujn orajn mensogojn. Tio estas la necesa kondiĉo, por ke Holivudo reskribas historion.

Lucilla kaj Livjo konversacias

Esperantisto de la Jaro

La Redakcio de la rusa E-gazeto «La Ondo de Esperanto» elektis la prezidanton de UEA Kep Enderby La Esperantisto de la Jaro 1999. *Lige al tio la redakcio faris intervjuon kun li, kiu aperis en «La Ondo de Esperanto». 2000: 2 (64)*

Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro*?*

Unue, kun grandaj surprizo kaj miro. Memoru ke mi esperantiĝis nur en 1987. Kompare al multaj aliaj, mi estas relative novbakita Esperantisto. Tamen, mi taksas ĝin granda honoro kaj provos pravigi ĝin.

Kep Enderby,, esperantisto de la jaro 1999

La internacia elektantaro aparte menciis du flankojn de via aktivado: komunuman (aktivan partoprenon en esperantistaj kongresoj: UK, SAT, Azia kaj naciskale) kaj movadan (precipe la sukcesan pledon por Esperanto en la Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en Seulo). Kia, laŭ via opinio, devas esti la ekvilibro inter la interna kaj ekstera flankoj de la vivo esperantista?

La respondo grandparte dependas de decido de la individuo, ĉar tia ekvilibro estas afero de juĝo. Ĝenerale, vidate de la vidpunkto de la Esperanto-movado, ege gravas kapablo sufiĉe bone regi la lingvon, kaj tio bezonas tempon. Kontraŭe, samtempe egale gravas movade, la kapablo eksponi al neesperantistoj la valorojn de la uzo de Esperanto por komunikiĝi kun alilingvanoj. Kadre de tio, ege gravas la estimo de viaj konatoj en la neesperanta mondo.

Rimarku, ke mi ne uzas la esprimon internacie ĉi tie, ĉar, parolante tute persone, kaj mi esperas honeste, malgraŭ ĉiuj aktualaj problemoj en la mondo — tiom ofte kaŭzataj de la malbeno de politikoj de aparteco aŭ de identeco — mi persone kredas ke la koncepto de nacioj estas artefarita. La celo de Esperanto estas pliharmoniigi la popolojn de la mondo kaj ne helpi je la disigado de ili.

Kiujn tendencojn en la nuntempa Esperantujo vi opinias plej subtenindaj?

Ĉiujn, kiuj celas la atingon de la baza idealismo de la origina Esperanto-ideo. Ĉi tie mi aludas ne al la distingoj inter, ekzemple, finvenkismo kaj raŭmismo, nek al la respektivaj meritoj de tiuj du Esperanto-skoloj aŭ -vidpunktoj, sed al la espero ke ĉiuj homoj, interlingve, sen rigardo al lingvaj, rasaj, aŭ aliaj etne similaj kulturaj baroj, vivu laŭ spirito de frateco.

Dankon. Kaj kion vi opinias negativa?

La kontraŭajn de tiuj, kiujn mi ĵus menciis: ĉiujn kiuj elmontras mankon de toleremo al aliaj kaj al tiuj aliaj vidpunktoj kaj tendencoj: alivorte, tiujn kiuj sektigas esperantistojn. La homa naturo estas tia kia ĝi estas, la elekto inter la du ne ĉiam estas facila.

Al kiu(j) persono(j) vi mem donus via(j)n voĉo(j)n, se vi estus elektanto ĉi-jare?

Tio estas malfacilega demando. Fakte, spite de mia plezuro ricevi tiun honoron, mi havas dubojn pri la meritoj de sistemoj laŭ kiuj honoroj estas donataj. Honoraj sistemoj havas kaj pozitivajn kaj negativajn flankojn. Sendube devas esti multaj, multaj aliaj meritindaj esperantistoj, nekonataj al mi,

kiujn estus maljuste preterpasi. Ne ĉiuj el ili estas anoj de UEA. Tamen mi opinias, ke se oni volas doni tian honoron al homo, escepte laŭ eksterordinaraj cirkonstancoj, oni devus ne doni ĝin al profesia esperantisto, kiom ajn meritplena li estas.

Se vi premas min, inter miaj konatoj, estas multaj kiuj meritas tian honoron. Mi pensus pri iuj el miaj kolegoj en UEA, ekzemple Renato Corsetti kaj Michela Lipari. Menciindaj ankaŭ estus Mark Fettes, Lee Chong-Yeong, Yamasaki Seikô, Giorgio Silfer, kaj Paulo Desajlley. Mi ĝojas, ke mi ne devas fari konkretan decidon.

Iam populara demando: kiujn tri librojn en Esperanto vi kunprenus, estante ekzilota al neloĝata insulo?

Respondo dependus de kiom longe mi restus sur la insulo. Sufiĉus diri ke mi unue pensus pri La danĝera lingvo, La Dekamerono kaj Sed nur fragmento.

Kion vi opinias pri la estonteco de Esperanto?

Nepre bonega, kvankam, ĉar mi ne estas aŭguristo, pri detaloj mi ne volas konjekti. La baza ideo de Esperanto restas bonega kaj ĝi inspiris multajn homojn dum la pasinta jarcento. Tio daŭros, kaj sendube la mondo estus pli bona loko, se pli da homoj uzus Esperanton. Tamen oni devas memori, ke uzata lingvo estas multe pli ol lingvo elektita de uzanto. Ĝi estas identigilo. Lingvo ankaŭ estas formo de superstrukturo, multe influita

de la ekonomika kaj socia bazoj, testamentita al popoloj kiuj vivtenas sin kadre de tiu ĉi heredita ekonomika kaj socia bazoj. Kontraŭe, iagrade, lingvo reciproke influas tiujn ekonomikan kaj socian bazojn.

La rezulto estas, ke okazas speco de objektiva historia procezo, en kiu la personaj voloj kaj preferoj de homoj rolas multfoje nur marĝene, kvankam kelkfoje grave. Ankaŭ politikistoj havas siajn proprajn rolojn. Ankaŭ ŝanco ludas gravan rolon. Ĉiurilate, la kaŭzoj de la nuntempa hegemonio de la angla lingvo memevidente konfirmas ĉiujn tiujn faktorojn. Ĉu tiu hegemonio daŭros, mi ne scias. Racio favoras Esperanton, sed racio ne ĉiam regas en la reala mondo. Intertempe, esperantistoj ĉie – ĉu anoj de UEA, ĉu de SAT, ĉu ano de iu ajn speco de alia esperanta organizo – devus strebi alvoki al tiu racio kaj plejefektivigi la realajn, idealismajn kaj praktikajn valorojn de Esperanto kaj eksponi tiujn al la cetera mondo. La monda esperantistaro estas minoritato ĉie, sed tio ne signifas, ke ĝi devas esti sen influo laborante por plibonigi la mondon.

Ĉu vi havas komentojn pri la kvar kritikaj rimarkigoj faritaj en "Esperanto en 1999"?

Nur por diri, ke vi pravis. Mi neniam sugestis ke la tasko faciliĝos.

Intervjuis Aleksander Korĵenkov <sezonoj@mail.ru> Adreso: RU-620014, Jekaterinburg-14, p.k. 162, Ruslando.

Triangulujo

Estas membroj de Esperanto-grupo en Freiburg (Suda Germanio), kiuj starigis redakcion por Esperanto-ma-gazino «TRIANGULUJO» en la loka «libera» radio, nome Radio Dreyeckland.

TRIANGULUJO serĉas kontakton al Esperantistoj muzikistoj kaj «radio-aktivaj» program-aranĝantoj.

Kio estas TRIANGULUJO, kiuj estas ni?

Ekde lasta septembro la Frajburg'a Esperanto-grupo starigis redakcion, kiu prizorgas radio-elsendon TRIANGULUJO en la loka «libera» (=privata, sed ne komerca = ne profitema) radiostacio.

Nia magazino TRIANGULUJO enhavas postrikoltitajn «novaĵojn» (parolitaj en du lingvoj: en Esperanto kaj en a loka germana dialekto = la «alemana») miksitaj kun muziko tipa por tiu libera radio (tio estas precipe, kion la samideanoj de Rokgazet'/Vinilkosmo nomas «bru-muziko», kaj krome ĉio aŭtentika, ankaŭ eksperimenta).

Krome - mi emfazu, ke ni **ne** *havas intencon instrui Esperanton dum niaj elsendoj. Ni simple uzas la lingvon tute memkompreneble kaj nature, same kiel iu ajn uzas sian lingvon. Sed nia intenco ja estas per interesaj elsendoj atentigi kaj scivolemigi la aŭskultantojn.*

TRIANGULUJO estis disaŭdigata de lasta septembro unufoje monate dum unu horo, ekde aprilo ni productos du elsendojn monate. Radio Dreyeckland estas ricevebla nur en regiono kun diametro de ĉ. 100 km (t.e. ridinda distanco kompare al dimensioj en aliaj landoj, kaj eĉ en Germanio tio ne tre grandas).

Ni alstrebas interŝanĝon de nia magazino TRIANGULUJO kun aliaj liberaj radioj. Nur komencinte tiun kampanjon antaŭ mallonga tempo, ni jam unu plian radiostacion gajnis por disaŭdigado, kaj ni esperas pli multajn, kiam ni koncentriĝas je tiucela propagando al ĉiuj kvardek liberaj stacioj en Germanio. (Kaj ni ne volos haltigi tiun agadon ĉe la landlimoj!)

2e) Kion ni bezonas?

1) MUZIKON. Estante muzikfakulo, vi certe scias, ke muziko, kiu taŭgas por nia radiostacio kaj aŭskul-tantaro, ne tro abundas en Esperantujo.

Ni aparte serĉas «brumuzikon» - (do: hardkoran, punkan ...) . Tipan muzikon de via lando - (se ĝi restis aŭtentika kaj ne estis elektronike «soft»igita por surmerkatiĝi - se tia ekzistas en Esperanto ?!) Tre interesa estus ankaŭ eksperimenta muziko.

Pro la malofteco de tia muziko en Esperantujo ni avidas ĉi-tian muzikon de ĉie en la mondo. - Kaj multe da tia muziko ne estas konata ĉi-tie. Ni volas ŝanĝi tion per elsendado de tia muziko en la programo TRIANGULUJO, tial ni petas VIN kontribui per via muziko.

2)RADIO. Por pli efike labori kaj por povi prezenti pli interesan programon, ni ankaŭ

serĉas kontaktojn al Esperanto-redakcioj en radio-stacioj de via lando. Kun ili ni povus interŝanĝi elsendojn aŭ minimume po partoj prezenti «kolaĵon» (mozaikon) el tiaj elsendoj. Tial ni petas vin peri al ni tiajn kontaktojn (se vi konas tiajn programojn).

3) TEKNIKO. Radio Dreyeckland disponigas al ni ĉiujn siajn teknikajn eblojn. Do ni povas akcepti sonojn per jenaj rimedoj:

CD - kompaktdiskoj,
MD - minidiskoj,
MC - muzik-kasedoj,
LP - longludaj diskoj
kaj - baldaŭ - ankaŭ DAT.

Sed ne nepre necesas iuj kostaj materialoj. Se vi povus disponigi al ni iujn «demo»-kasedojn provmaterialojn), ni ankaŭ ĝojus.

3e) Kion ni povas oferti?

Al MUZIKISTOJ kunlaborantaj momente ne jam tro multe. Sed certe la diskonigon de ilia muziko pere de la elsendo de TRIANGULUJO, kaj la mencion en nia interretpaĝo (kiu momente estas en konstruo kaj urĝe atendas ĝisdatiĝon.

(En perspektivo TRIANGULUJO estos aŭdebla en pliaj (multaj?) lokoj, tiel la muzikistoj ricevas pli da atento.

Al RADIO-REDAKCIOJ kunlaborantaj Interŝanĝon de interesaj programoj / programpartoj kun internacia akcento, do, materialon preta por disaŭdigo kaj pli grandan aŭskultantaron por propraj elsendoj.

Kion ni NE povas oferti estas rekta profito.

- Kaj la buĝeto de Radio Dreyeckland estas «modesta» ;-) (pli prave: ĝi montras minuson de 30.000 Eŭroj) T.e. ni ne havas monon por salajroj, kaj eĉ ne la monon por aĉeti ĉiun muzikon, kiun ni volonte ludos en la elsendoj. - Do, la profito povas esti nur nerekta, per konigo de la muziko al eblaj estontaj klientoj (kaj muzik-eldonejoj).

4e kaj laste)

Dankon ... pro via pacienca legado de tiu ĉi skizo de nia projekto.

Ni petas, ke vi sen reteno diru vian opinion pri la projekto, kaj kompreneble ni treege ĝojus, se ni povus gajni viajn spertajn konsilon kaj kunlaboron.

Tutamike el Triangulujo (la triangula regiono, kiu tuŝas tri landojn, nome Francion, Svision kaj Germanion).

Ursula

-TRIANGULUJO -

(TRIANGULUJO@esperanto.de)
PS: TRANSPORTO de materialoj perpoŝte kutime estas terure kosta. Se vi havas ret-adreson, ni volonte interkomunikos per retleteroj. Por transdono de materialoj ni laŭeble uzu «kurierojn», do bonvolemajn homojn, kiuj foje aŭ regule vojaĝas inter niaj landoj.

Enkonduko en muzikon

Gitaro estas tre simpla instrumento, popola kaj portebla. Tamen, ĝi enhavas sufiĉe da harmonio, por ke oni povu kanti kun ĝi kaj per ĝi, aŭskultante diversajn voĉojn samtempe. Gaspar Sanz, fama gitaristo hispana de la 17ª jarcento - verŝajne pentrita en la apuda grafikaĵo-, diris, ke gitaro ne estas damo kiu diras ***rigardu kaj ne tuŝu*** *(=ludi, hispane). Tiutempe gitaro havis jam kvin kordojn. Neniu scias pri kiu aldonis la sesan kordon, sed oni agnoskas S-ron Vicente-n Espinel-on kiel la enkondukanton de la kvina kordo. La kvaran, la kvinan kaj la sesan kordojn oni ankaŭ nomas bordonoj, kaj la unua kordo ankaŭ kromnomas la prima (tio estas, la unua, hispane).*

Ĉe ĉiu gitara metodo oni diras, ke la araboj enportis la gitaron kune kun si en la 8-a jarcento, kiam ili invadis la Iberian Duoninsulon. Eble tiu klarigas, ke dum en preskaŭ tuta Eŭropo oni ludis la ljuton dum jarcentoj, en Hispanio oni ludis la gitaron -malaltaj klasoj sociaj- kaj la vihuelan (pron. viŭela), tiuj altaj. Finfine oni komencis ludi la gitaron en la cetera Eŭropo ekde la 18-a jarcento, kaj nun la hispana gitaro apartenas vere al la eŭropa kaj eĉ monda kulturoj.

Gitaro estas sufiĉe humila kaj kompleta instrumento por enkonduki la ceteran parton de ĉi tiu kurso pri muziko.

Gitaro estas tre facile lernebla por akompani onies kanton. Oni povas aĉeti gitaron kaj post kelkhora instruado -kiun oni povas libre memlerni- oni povas akompani sian kanton glitante la fingrojn super la kordaro sciante formi nur tri akordojn.

Oni ankaŭ povas, male, tute ne kanti, sed permesi ke la gitaro kaj kantu kaj akompanu sin. Tio estas ludi solíste, kaj tiuj, kiuj neniam lernis gitaron serioze, diras, ke ĝi ege malfacilas. Pro tio, oni povas konkludi, ke gitaro estas kaj plej facila kaj plej malfacila samtempe.

Gitaro havas okan formon, kaj ĝi havas maston, je kies fino oni trovas kapon, kie oni ligas la ses kordojn. La aliajn finojn de la kordoj oni ligas al ponto, kiu estas proksime al buŝo de gitaro, kiu estas la granda truo, kiun oni povas vidi inter la du nuloj de la ok.

La ceterajn partojn de gitaro oni povas vidi en apuda grafikaĵo. Ni finpriskribos tiun instrumenton la venontan numeron, kaj daŭrigos nian kurson per gitaraj ekzemploj.



Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461,**
E30080 MURCIA,
HISPANIO

Retskribu al
jesuo@esperanto.nu

http://www.educar.org/Revistas/Esperanto/kajeroj.htm
http://www.dragonfire.net/~Esperanto/kajeroj.htm

Depósito legal: Z-2398-88
Presejo: Alegría.